

JUNIO 2002

SVENSKA  
ESPERANTO-  
TIDNINGEN

# La Espero

2002:2



Podia debato en Sveda  
Esperanto-Kongreso  
en Västerås

**Organ för Svenska Esperantoförbundet**

ISSN 0014-0694  
Junio 2002 • 90-a jarkolekto  
Fondita en 1913

**Redaktion:**

Leif Nordenstorm  
Franko Luin (teknisk redaktör)

**Frågor om prenumeration o. dyl.:**

Esperanto-Centro, Vikingagatan 24,  
113 42 Stockholm, tel. 08-34 08 00

**E-post:** [espero@esperanto.se](mailto:espero@esperanto.se)

**Ansvarig utgivare:** Leif Nordenstorm

**Utformning:** Omnibus Typografi, Tyresö

**Tryck:** HA Reklamtryck, Stockholm

**Prenumeration 2002:** 200 kr.

Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlemsavgiften. Postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

**ESPERANTOFÖRBUNDET**

**Adress:** Esperanto-Centro,  
Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,  
tel. 08-34 08 00

**E-post:** [sef@esperanto.se](mailto:sef@esperanto.se)

**Nätsida:** [www.esperanto.se](http://www.esperanto.se)

**Öppettider:** Esperanto-Centro har flexibla öppettider dagtid. Ring i förväg!

**Postgiro:** 20 12-3, Esperantoförbundet

**Medlemsavgift 2002:**

Direktansluten medlem 200 kr.  
Ungdomsmedlem (max 20 år) 100 kr. Medlemmar under 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU, Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund.  
Hel familj 300 kr (inklusive ett exemplar av *La Espero*. Tilläggsexemplar kostar 100 kr/år).

**ESPERANTOFÖRLAGET**

**Adress:** Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm

**Telefon:** 08 - 34 08 00

**Postgiro:** 578-5

**Nätsida:** [www.esperanto.se/eldona](http://www.esperanto.se/eldona)

**E-post:** [eldona@esperanto.se](mailto:eldona@esperanto.se)


**Telefontid:** Samma som Esperanto-Centro Stockholm.  
Skriftliga beställningar expedieras under hela året.

**Styrelsens ordförande:** Agneta Emanuelsson

**Manus till La Espero**

sänds till Leif Nordenstorm  
Järnvägsgränd 11  
961 76 Boden  
tel. 0921-123 54  
e-post: [nordenstorm@hem.utfors.se](mailto:nordenstorm@hem.utfors.se)

# Ole Hansen



Ole Hansen havis sian 50-jaran naskiĝtagon ĉi-jare. Tial la redaktoro de *La Espero* donis al li kelkajn demandojn.

**Kie vi naskiĝis? Kie vi nun loĝas?**

Mi naskiĝis en Danlando en Nørre Sundby ekster Aalborg, sed ekde 1975 mi loĝas en Sve dio, nun en Upplands Väsby.

**Pri kio vi laboras?**

Multaj esperantistoj rekonas min kiel la aŭtobusan ŝoforon, kiu kutimas veturi aŭtobuson al Esperanto-Gården.

**Kiajn interesojn vi havas krom Esperanton?**

Tio devas esti miaj genepoj el kiu tri loĝas en Svedio kaj du en Danlando.

**Ĉu vi havas familion?**

Niaj infanoj jam translokiĝis for de ni.

Do, hejme estas nur Kaisa kaj mi.

**Kial vi interesiĝis pri Esperanto?**

Kiam Kaisa kaj mi iam veturis per trajno, iu virino transdonis propagandilon. Tie estis lingvaj taskoj. Mi kaj Kaisa solvis ilin kaj sendis la respondon. Post tio ni ricevis lernolibron kaj estis invititaj al kurso en Esperantoförbundet, kie ni partoprenis kurson dum du jaroj. Poste ni kune kun kelkaj homoj fondis klubon en Väsby, kies prezidanto mi nun estas.

**Ĉu ekzistas aliaj interesaĵoj pri vi?**

Mi fakte laŭprofesie estas riparisto de aviadiloj. Pri tio mi laboris dum kelkaj jaroj. Mi ankaŭ havas sperton pri riparado de domoj. Do, mi povis helpi pri tio en Esperantogården.

Dankon pro la intervjuo!

# Bona etoso en Västerås

*Estis ankaŭ tempo por distrado*

En la centro de Västerås, en Arosgården okazis Sveda Esperanto-Kongreso 3-5 Majo 2002. Mi mem ne havis la eblecon partopreni dum la lastaj dek jaroj pro familiaj kialoj. Tial mi aparte ĝojis ke mi denove povos renkonti partopreni la svedan kongreson. Jam vendrede vespero komencis kolektiĝi kelkaj partoprenantoj al neformala kunestado. Jam de komence ĝis la fino la klubo de Västerås faris bonan laboron organizi la kongreson.

## Jarkunvenoj

Sabate okazis tri jarkunvenoj. Unue tiu de Eldona Societo Esperanto kaj poste tiu de la sveda sekcio de la in-



*Dum la jarkunveno de Sveda Esperanto-Federacio*

struista ILEI.

En ĵa jarkunveno de Sveda Esperanto-Federacio estis du novaĵoj. Dum la legado de la jarraporto ni eksciis ke la nombro de membroj kreskis per 50 ĝis 830. Tio estas bonega novaĵo post multaj jaroj kun falanta membronombro. La tendenco tamen estas ke multaj novaj membroj estas rektaj membroj, do ne membroj en kluboj. Ili eksciis pri Esperanto per interreto aŭ per libroj kaj poste membriĝas. La risko estas ke ili ne renkontiĝas kun aliaj esperantistoj. La alia novaĵo estas sekvo de tiu tendenco. Oni diskutis ĉu estonte ĉiuj membroj, do ne nur la reprezentantoj de la kluboj havu voĉdonrajton en la jarkunveno de SEF. Oni nenion decidis pri tio, sed denove diskutos la aferon.

*Ĉiuj fotoj de la kongreso: Ole Hansen.*

## Kulture

Sabate vespere estis koncerto kun Nata kaj Andreo, kiu kun granda ĝojo kaj entuziasmo kantis en kaj pri Esperanto. Iam mi aŭdis ke nur movado, kiu kantas estas vere vivanta movado. Mi samopinias. La vespero finiĝis per dancado.

## Adoru kaj Oomoto

Dimanĉe mi, Leif Nordenstorm, gvidis diservon laŭ la nova, pli ol 1400-paĝa libro "Adoru", kiu aperis en Esperanto. Ĝi estas komuna por katolikoj kaj protestantoj kaj enhavas kaj himnojn kaj ordojn por diservoj kaj preĝojn. Vera valorajo en nia kulturo. Recenzo aperos en La Espero.

Poste okazis la tradicia aŭkcio pri libroj, vendataj favore al Sveda Espe-

ranto-Federacio. Mi ankaŭ prelegis pri mia doktoriĝa temo, la rilato inter la Japana religio Oomoto kaj Esperanto.

## Kongresoj necesaj

Partoprenis la kongreson ĉirkaŭ 50 personoj. El ili estis tri eksterlandanoj: unu Danino kaj du Ukrainanoj.

Por mi estis grandega ĝojo veni al Sveda Esperanto-Kongreso. Ni vere bezonas unu komunan aranĝojn ĉiujare. Precipe ni, kiuj loĝas en lokoj kun malmultaj aliaj Esperantistoj.

**Leif Nordenstorm**

*Partoprenantoj de la kongreso*



# Podia diskuto pri lingvoj

*Kadre de la SEF-kongreso en Västerås okazis podia diskuto pri lingvoj ĝenerale kaj pri Esperanto. Kiel preparo al la diskuto funkciis prelego de Mikael Parkvall, doktoro pri lingvistiko ĉe la universitato de Stokholmo. La prelego estis ĝenerala orientiĝo pri la lingvosituacio en la mondo.*

## La lingvoj de la mondo

Resumo de la prelego: Ekzistas 4000-8000 lingvoj en la mondo. La cifero estas tiel nepreciza, ĉar estas malfacile difini kiuj lingvovariaĵoj estas lingvoj kaj kiuj estas dialektoj. 98-99% el ĉiuj lingvoj en la mondo havas malpli da parolantoj ol kion havas la sveda. Averaĝa lingvo havas ĉirkaŭ 50 000 parolantojn. La 20 plej grandaj lingvoj estas parolataj de ĉirkaŭ duono de la homaro. 98-99% el ĉiuj lingvoj estas neoficialaj kaj ofte neuzataj en skribo. El ĉi tio sekvas ke apenaŭ ekzistas unulingvaj landoj; Islando estas unu escepto. Averaĝa loĝanto de la Tero parolas 2 lingvojn. Multaj lingvoj malaperas. 90% el la lingvoj kiuj nun troviĝas en norda kaj suda Amerikoj malaperos ene de unu jarcento. Samspecaj tendencoj troviĝas ĉie en la tria mondo, kie estas la plejmulto el ĉiuj lingvoj. La parolantaro de lingvo povas malpliigi pro genocido, kiel je la jida, sed ofte temas pri tio ke la parolantoj transiras al alia lingvo. Kiam la restantaj parolantoj estas nur maljunuloj la lingvo plej probable malaperos. Estas ege malfacile "revivigi" lingvon kiun oni

ĉesis paroli. Parkvall donis ekzemplojn pri subpremo kaj malpermesoj kontraŭ diversaj lingvoj. En Bulgario oni devigis al turklingva minoritato ŝanĝi siajn nomojn al bulgaraj. Eĉ la tomoŝtonojn oni alinomis. Turkio estas alia ekzemplo pri lando maltolerema al lingva minoritato (la kurdoj). Parkvall aldonis, ke esperanto estas kredeble la plej malpermesita lingvo en la mondhistorio - la lingvo malpermesita en la plej multaj landoj.

La kultura imperiismo estas granda minaco kontraŭ la lingva diverseco. La angla ne havas la plej multajn parolantojn en la mondo, sed i.a. pro ekonomiaj kialoj ĝi dominas en grado ĝis nun nekonata en la mondhistorio. La landoj de denaskaj anglalingvanoj kune havas 39% el la tutmonda BNP (brutta nacia produkto). Usono mem havas 24% el la tutmonda BNP. Kaj Parkvall prezentis kelkajn statistikojn pri la pozicio de la angla.

80% el la monda loĝantaro ne parolas la anglan. Tamen i.a. svedoj tendencas supertaksi la rolon de la angla en la mondo; ili ankaŭ supertaksas sian propran konon de la ang-



*Mikael Parkvall, doktoro pri lingvistiko enkondukis la podian debaton*

la. La plej multaj homoj en la mondo ne parolas la anglan aldone al sia propra lingvo; tio estas iluzio.

Parkvall bedaŭris ke multege da lingvoj malaperas, sed li ne havis argumenton por konservado de la lingva diverseco.

## La diskutantoj

La diskuton gvidis Maria Ekman, kiu instruas filozofion ĉe la Altlernejo de Skövde. Ŝi laboras pri diversaj filozofiaj projektoj kiel instruado pri filozofio, filozofiaj kafejdiskutoj, k.a. Gunilla Zimmerman estas instruisto pri la sveda lingvo por enmigrintoj. Antaŭe ŝi instruis la germanan. Thomas Gjerdingen estas produktoro-prezentisto ĉe la loka sekcio (Radio Västmanland) de Sveda Radio programo 4. Li interesiĝas pri la parolata lingvo kiel laborilo. Roland Lindblom estis prezidanto de SEF dum multaj jaroj. Nun li estas prezidanto de LKK por UK en Gotenburgo 2003. Kune kun teamo li preparas Esperanto-svedan vortaron. Tanja Linderborg estas membro de la sveda parlamento (por la Maldekstra Partio) kaj prezidanto de la leĝa komisiono de la parlamento. Mikael Parkvall estas doktoro pri lingvistiko ĉe la universitato de Stokholmo. Lia specialaĵo estas pidĝinaj kaj kreolaj lingvoj; li ankaŭ interesiĝas pri mikslingvoj. RL kaj MP scipovas esperanton.

## La diskuto

Maria Ekman prezentis nombron de demandoj por eki kaj stiri la diskuton. Mi pritraktos nurkelkajn punktojn, mallonge. La diskuto daŭris ĉirkaŭ du horojn kaj duono, unu horon pli ol estis planite.

Demokrata lingvoordo: MP diris, ke tio estas du demandoj: kiujn lingvojn oni uzu kaj kiujn lingvovariaĵojn oni uzu en certaj situacioj. Ĉu via loka dialekto taŭgu en ĉiuj situacioj? ekzemple. (La diskuto ektemis pri svedaj dialektoj kaj minoritataj lingvoj, ne pri internacia komunikado, kion ni esperantistoj ja ŝatas pritrakti. Sed demokratia lingvoordo ja koncernas ĉiujn flankojn de la vivo kaj dialektoj kaj minoritataj lingvoj ŝajne pli interesas la podianojn. Nu, la diskuto fariĝis pli interesa pro tio.)

La angla en Svedio: I.a. oni diskutis la demokratiajn problemojn je uzo de la angla, pri la troa anglumado en anoncoj, k.a. GZ diris ke estas ia von oben-attitudo ke oni parolu la anglan en Svedio; multaj svedoj tute ne parolas la anglan.

La angla en la mondo: RL citis artikolon en la brita gazeto The Guardian antaŭ nelonge. Laŭ ĝi British Council avertas kontraŭ la ŝajne senrezista disvastigo de la angla. Rezisto povas ekesti kaj la disvastigo povas asociiĝi kun detruo de aliaj kulturoj, tiel kiel oni nun opinias pri la dehakado de praarbaroj. MP diris, ke la angla ne perdos sian pozicion rapide. La angla hazarde estis uzata kiam alvenis la tutmondiĝo kaj la tutmondiĝo ne estas malfarebla.

Koncerne Esperanton: TL opiniis ke ĝi ne estas neŭtrala ĉar ĝi estas bazita sur la latina kaj latinidaj lingvoj. Ŝi konsideras la enkondukon de Esperanto utopia, sed ŝi ne kontraŭas ke oni vivu per revoj. Kelkaj aliaj el la podianoj demandis pri nia lingvo.

## Komento

Multo el tio dirita dum la diskuto estis jam konataj aferoj por longdaŭraj esperantistoj. Tamen estas valore daŭre informadi ene de la movado pri lingvoj ĝenerale: tiel oni povas plibonigi siajn argumentojn pri Esperanto.

Christer Lörmemark

# Eldona Societo Esperanto, kiun posedas pli ol 300

## MENDU LIBROJN DE ELDONA

### BELETRO

Aniara (90 kr).  
Bona rido (30 kr).  
Inter sudo kaj nordo (60 kr).  
Islandaj pravoĉoj, bind. (60 kr).  
Islandaj pravooj, broŝu. (45 kr).  
Jaroj sur tero (60 kr).  
NOVA Kion ajn (60 kr).  
Kredo Floroj Dinamito (45 kr).  
Orm la Ruĝa (150 kr).  
Printempo de morto (60 kr).  
Ŝipestro rakontas (45 kr).  
Tra lando de indianoj, bind. (60 kr).  
Tra lando de indianoj, broŝu. (45 kr).  
Vivu la stel' (Kantaro, 30 kr).

### LERNILOJ/GRAMATIKOJ/VORTAROJ

Allas andra språk (75 kr).  
Eki (75 kr).  
Jen nia mondo 1 (90 kr).  
Jen nia mondo 2 (90 kr).  
Esperanto-Kompendium (120 kr).  
Raka vägen till språkkunskap (45 kr).  
Språket över gränserna (45 kr).  
Svensk esperantogrammatik (75 kr).  
Esperanto-svensk ordbok (90 kr).  
Etimologia vortaro 1 (150 kr).  
Etimologia vortaro 2 (150 kr).  
Kvanto: Etimologia vortaro 3 (150 kr).  
Kvanto: Etimologia vortaro 4 (150 kr).  
Kvanto: Etimologia vortaro 5 (240 kr).  
Etimologia vortaro 1+2+3+4 (500 kr).  
Lilla ordboken (90 kr).  
Ordbok Svenska-Esperanto (450 kr).  
komputora versio por Macintosh (600 kr).

### MUZIKO

Folioj de mia memoro (Ĵomart & Nataŝa) (90 kr).  
Denaska kongresano; 2 ljudband (120 kr).

### DOKTORA DISERTACIO

NOVA Ŝmotos mission på esperanto. (150 kr).

La prezoj estas en svedaj kronoj (SEK) kun sveda varimposto.  
Sendkosto aldoniĝas.  
Mendu de: Eldona Societo Esperanto,  
Vikingagatan 24, 113 42 Stofckholm.  
Retpoŝto: eldona@esperanto.se

Eldona Societo Esperanto fondiĝis en 1918. En la sveda oni nomas ĝin oficiale "Förlagsföreningen Esperanto u.p.a.", sed praktike ofte "Esperanto-förlaget". En Esperanto oni ofte uzas la mallongigon "Eldona".

Ĝi estas la plej malnova Esperanto-eldonejo en Svedio, kiu ankoraŭ ekzistas. Ĝi verŝajne eldonis pli ol 100 librojn. (Se iu scias la ekzaktan nombron, aŭ havas liston pri ĉiuj, bv. informi min.) Inter la malnovaj oni povas mencii "Per balono al la poluso" de Andrée, Strindberg kaj Frænkel, kiu aperis en 1930. Alia aparte grava eldonaĵo estas "Sveda antologio" en du partoj.

La nomo "Eldona Societo Esperanto" montras ke ĝi estas ekonomia societo. Ĝis nun pli ol 300 esperantistoj kaj kluboj aĉetis frakciojn (partojn) de ĝi. Ĉiu rajtas aĉeti novajn. Unu kostas nur 10 kronojn.

## Du ĝis kvar novaj libroj en 2002

En 2002 aperis du kaj eble aperos du novaj libroj ĉe Eldona. Unu estas doktora disertacio de Leif Nordenstorm: "Ŝmotos mission på esperanto. En japansk ny religion i förändring från kiliastisk Maitreyaförväntan till religionsdialog". Ĝi estas en la sveda, sed kun resumoj en Esperanto kaj en la angla. Aperis ankaŭ "Kion ajn", romano de Sten Johansson, kun facila lingvaĵo. Ĝi estas la unua en serio por komencantoj. Sten Johansson estas nuntempe la plej aktiva Esperanto-verkisto en Svedio. Li ricevis plurajn internaciajn premiojn. Unu el liaj specialaĵoj estas ĝuste facillingva verkado.

Aperos "Dharmapado", Budhisma klasikaĵo en traduko de Gunnar Gällmo. Ĝi aperos en la prestiĝa serio Oriento-Okcidento, kiu celas konatigi la kulturajn valoraĵojn de diversaj landoj. Aperos ankaŭ malgranda libro pri Budhismo, verkita de Gunnar Gällmo.

Ni verŝajne skribos pli multe pri tiuj ĉi libroj estonte.

## Pri Esperanto en la sveda

Eldonejo bezonas strategion. Tial la jarkunveno diskutis pri propono de Bertil Nilsson, pri ideoj, kiujn la estraro antaŭe diskutis. La ideo estas ke la plej grava projekto por la eldonejo dum la venontaj jaroj estas eldoni informlibron pri Esperanto en la sveda lingvo. Ni bezonas "interesigilon", kiun povas aĉeti niaj urbaj kaj komunumaj bibliotekoj, kaj kiujn povas legi neesperantistoj kaj interesiĝi pri Esperanto. Ekzistas jam planoj, kiel tia libro povos esti verkita.

Kompreneble estas ankaŭ grave ke Eldona aranĝos ke ĉiam ekzistos bonaj lernolibroj kaj vortaroj, sed fakte nun multaj tiaj ekzistas. Ni nur atendas novan Esperanto-svedan vortaron, kiu nun estas verkata.

Alia ideo estas ke oni daŭre eldonas facillingvajn librojn.

## Ĉu vi jam legis ilin?

Ĉu vi jam legis la librojn, kiujn eldonis Eldona? Se ne, kial ne mendi kelkajn por havi legaĵon dum la ferio, aŭ dum la aŭtuno, se vi tion preferas.

Vi ankaŭ povas iri al via biblioteko kaj proponi al ili aĉeti kelkajn. Ĉiu biblioteko havu almenaŭ modernan lernolibron kaj modernajn vortarojn. Montru al ili la anoncon sur tiu ĉi paĝo.

## Nova estraro en Västerås

En la jarkunveno de Eldona en Västerås estis elektita nova estraro. Ole kaj Kaisa Hansen demisiis de siaj taskoj kaj oni dankis ilin por ilia laboro. Nova prezidanto fariĝis Agneta Emanuelsson; estraranoj: Franko Luin kaj Bertil Nilsson; anstataŭantoj: Gunnar Gällmo kaj Leif Nordenstorm.

Leif Nordenstorm

**KORESPONDI  
DEZIRAS**

Profesoro José Takedara darigas de post multaj jaroj sian disvastigon de Esperanto tra Japanio. Ĉiun jaron li havas novajn studentojn universitatajn pri lingvoj kiuj serĉas interretan korespondadon kun gejunuloj tutmonde.

Fraŭlino Wakana Osada  
(wakanao@ya3.so-net.ne.jp)  
esperante kaj portugale.

Fraŭlino Noriko Matsumoto (norikom46@hotmail.com)  
esperante kaj france.

Fraŭlino Kaori Oda  
(cha-lin@olive.freemail.ne.jp)  
esperante kaj france.

Fraŭlino Hiroko Yasuoka  
(hyasuoka@lycos.ne.jp) (hjbarr@  
hotmail.com)  
esperante kaj angle.

Fraŭlo Toshiaki Mori (metashuttle@  
olivedoor.com)  
esperante kaj angle.

Fraŭlo Yuichiro Tanaka  
(yuichirovic@lycos.ne.jp)  
esperante kaj angle kaj germane.

## Nova Ponto trans la Sundo

Verŝajne vi jam scias ke estas nova ponto trans la Sundo (Öresund). Tamen estas ankaŭ nova Ponto. "Ponto" estas la nomo de nova gazeto por la Esperanto-klubo en Malmö, Lund, Helsingborg kaj por la tri kluboj en Kopenhago. Ponto estu eldonota po 7 fojoj jare.

Oni ankaŭ komencos kunlabori en aliaj kampoj, ekzemple aranĝante komunajn kursojn por komencantoj kaj Kulturana Esperanto-Festivalon en Elsinoro (Helsingör) kaj Helsingborg post la Universala Kongreso en Gøteborgo en 2003.

En Ponto oni povas legi ke la Kopenhaga Esperanto-Kulturgrupo havas popularan prelegserion, en kiu oni ekzemple povas aŭskulti prelegon pri la vivo kaj verko de la Esperanta verkisto Kálmán Kalocsay.

## Sölvesborg kunlaboras kun Esperanto-klubo

Sydöstra Sveriges Dagblad skribis artikolon pri kunlaboro inter la komunumo de Sölvesborg kaj la Esperanto-klubo de Västerås. La urbo Malbork en Pollando, kiu estas ĝemela urbo kun Sölvesborg, aranĝis parkon apud la Zamenhofa foiro, kie estu memoraj ŝtonoj kaj arboj. Alvenis ŝtonoj kaj arboj el Rusio, Litovio, Pollando, Francio kaj nun ankaŭ de Sölvesborg en Svedio.

La Esperanto-klubo en Västerås helpas, ĉar ili antaŭe havis kontakton kun la urbo, kie multaj, ekzemple la vicurbestro Danuta Stanek-Gutowska, unu al la iniciatintoj de la parko, parolas Esperanton.

## IJK 2003 en Svedio

Estas decidite ke la Internacia Junulara Kongreso en 2003 okazos en Svedio. Antaŭe oni diskutis pri Litovio, sed post ekzameno de la eblecojn okazigi la IJK-n en Nordio, TEJO decidis, ke ĝis okazu en la sama lando kiel la UK, do Svedio.

Interkonsento jam estas preta kun Esperanto-Gården en Lesjöfors, kiu estos la gastiganto de IJK. Ĉar E-G mem ne sufiĉas por gastigi ĉiujn partoprenantojn, oni utiligos ankaŭ Folkets hus kaj la lernejon.

## Spirita gvidanto aktiva Esperantisto

La kvina spirita gvidanto de la Oomoto-religio en Japanio, DEGUĈI Kurenai, kiu fariĝis gvidanto post la morto de la kvara en 2001, estas aktiva Esperantisto. DEGUĈI Kurenai naskiĝis en 1956, studis farmakologion kaj poste laboris en ĉinmedicina kuracejo. Ŝi kompetentas pri artoj de teceremonio, noo kaj japana floranĝo, amatoras pri kuirado, legado, kudrado kaj ĉevalrajdo.

Ŝi lernis Esperanton kaj partoprenis i.a. en la Universalaj Kongresoj en Rotterdam en 1988 kaj en Brighton en 1989.

## TRA LA LANDO

### 19 partoprenis distanckurson

Dek ok svedoj kaj unu dano partoprenis distanckurson pri Esperanto en la printempo, aranĝitan de Karlskoga popola altlernejo. Oni ne devis viziti Karlskogon entute, sed ricevis instruadon kaj faris taskojn per interreto. La instruisto Lars Forsman estas kontenta pri la kurso.

Cetere Lars Forsman, kiu dum multaj jaroj ĉiutagite gvidis la Esperanto-programon en Karlskoga pensiuligoj je la jarfino. Dum la aŭtuno oni tamen povos studi en la Esperanto-programo kiel kutime. Post tio estas necese trovi novan Esperanto-instruiston, se la lernejo decidis daŭre aranĝi la programon.

### Printempa festo kun albana popolmuziko

La klubo de Malmö anoncis la temon de sia printempa festo. Muzikologo Birthe Traerup estis rakontonta pri ekspedicio entreprenita al Kosovo kaj Makedonio por esplori albanan popolmuzikon. Ŝi estis ilustronta la rakonton per videofilmo bazita sur muzikregistraĵoj, fotografajoj kaj filmo.

## AIS serĉas planas universitaton

Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino, kiu ekde sia ekzisto uzis Esperanton dum pli ol dek jarojn aranĝis universitatajn sesiojn en diversaj landoj, ne ĉiam en San-Marino.

Oni nun planas starti en la urbo Komárno interkulturalan universitaton. La urbo situas ambaŭflanke de la slovaka-hungara limo.

La universitato komence konsistu el tri fakultatoj; bazosciencia, kiu i.a. ellaboras plurlingvajn terminologiojn, enciklopediojn k.t.p.; fakultato pri kulturprotektado kaj pri etnaj minoritatoj; fakultato pri kultura dialogo kaj pri religia historio.

### Literatura kurso en Skövde

Klubo Esperantista en Skövde reelektis sian tutan estraron dum la jarkunveno: Torsen Hammargren, prezidanto, Kurt kaj Hildon Frisk, Solveig Bertilsson, Börje Andersson, Carl-Erik Ohlsson kaj Rune Andersson. La membronombro estas 37. Kelkaj membroj loĝas en Falköping, Skara kaj Götene.

Dum la jaro 2001 la klubo havis sep kunvenojn kun variaj programoj. Ok membroj partoprenis literatur-kaj lingvokurson kun Hildon Frisk kiel gvidanto. Carl-Erik kaj Solveig Bertilsson daŭrigas sian agadon kun la presejo kaj eldonejo Alfabeto. Dum la jaro ĝi presis kvin etajn librojn.

### Floroj sur la tombo de Nylén

Meze de majo sub forta printempa pluvo kelkaj anoj de la klubo de Upplands Väsby metis florojn kun rubando 'Esperanto i Väsby memoras kaj honoras la esperantopioniron' sur la tombon de Paul Nylén, por tiamaniere montri sian estimon al lia nemezurebla signifo por la sveda esperantomovado.

Anita Bergh

## DONACOJ

## RONDO LANGLET

Ingrid Göransson, Kalmar, 200 kr; Leif Nordenstorm, Boden, 150 kr; Lenart Sundman, Västerås, 100 kr; Göran Lundgren, Stockholm, 100 kr; Tore Johansson, Kalmar, 100 kr; Signild Johansson, Kalmar, 100 kr; Börje Andersson, Skövde, 100 kr; Bengt Nordlöf, Stockholm, 84 kr; Sten Anders Hannerz, Skogås, 84 kr; Wim Posthuma, Västerås, 84 kr. (Ĉiumonataj donacoj.)

## KLUBO CENT

Alice Johansson, 100 kr.

## MEMORE AL NILS-ERIK KRISTOFERSON

Gertrud Lund, Malmo.

## MEMORE AL INGEMAR NORDIN

Varijaj sumoj de: Kaisa Hansen, Upplands Väsby; Börje Andersson, Skövde; Jan Eric Bülund, Sundsvall; Arne Hermansson, Uddevalla; Göran och Eva Kochs, Spånga; Vera Olsson, Munkfors; Tora Olsson, Ockelbo; Ulla och Franko Luin, Tyresö; Bertil Danielsson, Årjäng; Rune Evert Nilsson, Årjäng; Siv och Conny Eriksson, Karlstad;

## Gotenburgo aktivas antaŭ UK

Se vi ne jam notis la datojn 26 julio - 2 aŭgusto 2003 en via kalendaro, faru tion, ĉar tiam okazos la Unversala Kongreso de Esperanto en Gotenburgo.

La Gotenburgoj intense aktivas por plani la UK-n. Pri la kongreso mem ni raportos en La Espero dum la venonta jaro. Nun ni raportos pri la Esperanto-Societo de Gotenburgo, laŭ ilia revuo Inter-Ligilo.

La klubejo estas malfermita ĉiumarde je 18.00-19.00. Jarkunveno okazis la 19-an de marto. Tiam oni raportis pri okazintaĵoj dum 2001. (Pro 2001 oni povas menciigi ekzemple ke la radioprogramo "Språket" unufoje temis pri Esperanto kaj ke la loka televida-stacio de TV 4 faris programon pri la klubo. Cecilia Malmström, ano de la Eŭropa parlamento vizitis la klubon.

La 27-an de aprilo oni aranĝis promenadon tra Lerum kun renkontiĝo kun lokaj Esperanto-parolantoj. La loka Esperanto-kurso invitis. Post promenado laŭ la rivero Sävån kaj kafopaŭzo estis prelegeto pri Lerum kaj muziko.

La urba biblioteko havas ĉirkaŭ 800 librotitolojn en kaj pri Esperanto. Pruntu! Ankaŭ dedistance!

La klubo je la fino de la jaro havis 77 membrojn.

La retpaĝo de la societo estas <http://hem.fyrlistorg.com/chlo/societo.html>

Estas ankaŭ retpaĝo por UK: <http://lkk-gotenburgo.gg.nu>

## Stokholma urba promeno

En Stokholmo Sten Johansson gvidis literaturan promenon. Li laŭlegis pecojn el originala Esperanta kaj tradukita literaturo, kiu havis rilaton al diversaj lokoj vizitataj dum la promeno.

En la sama urbo Anita Bergh, iniciatis esploron pri Paul Nylén, lia tombo kaj iama loĝejo, konata kiel "La verda vilao".

# Libroservo en via domo

Mi ricevas ofte demandojn, kiel povas esti, ke la elektronikaj libroj en eLibrejo estas senpagaj, ĉu ili nelojale konkurencas kun libroj vendataj de la libroservoj, kaj simile. Anstataŭ respondi mem, mi citas el letero de irana studento, kiun mi ricevis antaŭ nelonge:

*"Mi konfesas al vi ke nur dank'al via paĝo mi povis legi E-ajn tradukojn de 'Fratoj Leonoro' kaj 'La eta princo', kiujn antaŭe mi legis perslingve, sed entuziasme mi atendis, ke mi povu legi ilin ankaŭ Esperante! Post la legado de ĉi tiuj du librojn, al mi venis ideo! Mia amiko Savisa Mahvar, studento de franca lingvo en la Nacia Universitato de Tehrano, iam antaŭe verkis libron kiun li nomas: 'Ree la eta princo'. Mi ne intencas plie paroli pri ĉi libro. La aneksa ekspedaĵo, kiu akompanas ĉi leteron estas elpersigita versio de tiu libro. Ni, Savisa kaj mi, kiel verkisto kaj tradukanto de la libro, ŝatas dediĉi la libron al via kolekto de e-libroj. Mi esperas, ke vi akceptos nian malgrandan donacon kaj nemetos ĝin inter viajn valorajn e-librojn."*

Jen konkreta ekzemplo, kion oni povas atingi per vastskala distribuado de esperanto-libroj.

Ĉi tiu distribuado estas senpaga kaj ĝi iagrade konkurencas kun la libroservoj. Sed plej multaj de la libroj ne plu estas haveblaj, aŭ estas haveblaj tre malfacile. Ili ofte tamen estas de tiaj, ke ili meritas, ke oni levu ilin reen al la lumo, tiel ke la nunaj legantoj konatiĝu kun ili. Aliaj estas relative freŝaj libroj, aĉeteblaj ĉe la libroservoj. Ilin kelkaj eldonejoj aperigis elektronike kvazaŭ varbilojn por la presita eldono. Kaj ekzistas tria grupo de elektronikaj libroj, t.e. tiuj, kiuj nur ekzistas elektronike. Relative multaj estas de tiu speco. Presado de libroj estas agado, kiu postulas monon kaj eldonado de libroj en esperanto estas agado, kiu ligas monon por tre longa tempo, ĉar la libroj malrapide vendiĝas. La elektronikaj eldonoj postulas unuavice tempon por la preparo. Se oni ne kalkulas kiel entreprenoj, ke "tempo estas mono", oni povas diri, ke la investo en ĉiun novan libron estas tre malalta.

Inter la libroj en eLibrejo plej mul-

taj estas beletraĵoj, de plej renomaj aŭtoroj, kiel Lagerlöf, Strindberg, Puŝkin, Shakespeare, Dickens, Hašek), al aliaj pli malpli nekonataj. Ni bezonas legi ne nur malfacilajn tekstojn, sed ankaŭ tekstojn, kiuj kontentigas nian bezonon de romantikemo, streĉiteco kaj pura tempopasado. Kunlabore kun Miroslav Malovec el Ĉeĥio mi planas reeldonon elektronike ankaŭ de libroj, kiujn oni nomas "kioskoliteraturo", t.e. verkita de aŭtoroj, kiuj ne celas ricevi la Nobelpremion. Sed tiuj libroj estas facile legeblaj, enhavas taŭgajn kvantojn da romantiko, aventuroj, trompoj, kompreneble, feliĉan finon.

Kun la sama Miroslav Malovec mi jam komencis prepari la reeldonon de la unua romano originale verkita en esperanto: "Kastelo de Prelongo" de Henri Vallienne, kiu aperis en 1907 kaj neniam estis represita. Temas pri dika libro, verŝajne 700 paĝoj en la elektronika versio. Tiu libro certe estos interesa por ĉiuj, kiuj kun intereso sekvas la t.n. "telenovelojn" aŭ "sapoperojn", ĉar ĝi estas absolute plena de intrigoj, trompoj, perfortoj, fortaj pasioj — amego kaj malamego — kaj similaj ingrediencoj, kiuj altirus milionojn da rigardantoj por ĉiu epizodo, se ĝi estus montrata en televido.

